# NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es

**APRILO 2010**


**KAFKUNVENO**

Okazis la sabaton 20an de marto kunveno en kafejo-librejo Fuentetaja, kunvokita kiel kutime per la retpoŝta listo "esperanto-madride". Ĉeestis ok homoj, kiuj iom planis venontajn agadojn.

Tiu kafejo havas avantaĝon: ke normale ĝi havas malmultan bruon, kaj malavantaĝon: ke ni ne rajtas brui tro.

**KURSOJ**

- Pedro A. Hernández gvidas konversacian kurson en la HEF-ejo la vendredojn vespere. Por informiĝi kaj aliĝi, sendu malplenan mesaĝon al la retadreso: esperantovallekas-subscribe @yahoogroups.com

**EN HISPANIO**

REMALFERMAS LA MUZEO DE ESPERANTO

Ekde la vendredo 9ª de aprilo denove funkcias la konata Muzeo de Esperanto de Sant Pau d'Ordal, nun nomata de Subirats (la municipo). Okaze de la reinaŭguro oni celebris kelkajn publikajn eventojn dum la semajnfino, kun ĉeesto de aŭtoritatuloj kaj amasmedioj. Ĝi nun apartenas al Rafael, filo de la karmemora Lluis María Hernández Izal.

KATALUNOJ BABILADAS

Organizite de Kultura Asocio Esperantista de Katalunio kaj aliaj E-grupoj, okazis la dimanĉon 21an de marto babilado pri la temo "Alianco de civilizacioj", en kultura centro en urbo Castelldefels, kaj sekva kunmanĝo en proksima restoracio.

*Informis: Luis Serrano Pérez*

**IBERIA RENKONTIĜO**

La 6ª Iberia Renkontiĝo okazis en Almagro, regiono La Mancha, de la 9ª ĝis la 11ª de aprilo. Ĝin organizis HEJS, la junulara sekcio de HEF, en bela historia konstruaĵo apartenanta al la Provinca Deputitaro de Ciudad Real. Kvardek partroprenantoj, plejparte junaj, ĝuis la lokajn historion kaj vinon, vizitis la nacian naturparkon Las Tablas de Daimiel, ludis, debatis, konis pri novaperintaj libroj, kaj spektis etan teatraĵon en la XVIIjarcenta Corral de Comedias, en kiu la geaktoroj aparte salutis nin la esperantistojn.

Pri la evento bone raportis la du provincaj ĵurnaloj, kelkaj regionaj televidkanaloj kaj la hispana nacia radio RNE.

## TRA LA MONDO

**PS2010: PAPERA VERSIO AĈETEBLA**

La papera versio de Pasporta Servo 2010, kun 1450 adresoj en 91 landoj, jam disponeblas en la libroservo de UEA, prezo 9 € plus sendokosto.

**VIKIPEDIA KONKURSO: MONATO DE VIKIPEDIO**

La esperanta Vikipedio organizas dum aprilo grandan konkurson por instigi verkadon. Tiu konkurso estas malfermita al ĉiuj kiuj pretas kontribui, spertaj vikipediistoj aŭ ne.

La konkurso premias ne nur kvanton, sed ankaŭ grave kvaliton juĝante la plibonigadon de artikoloj kaj aprezante bonan laboron de la plej lertaj kontribuantoj. Legu pli: http://tejo.org/eo/vikipedia_konkurso

El Tejo-aktuale nro 240

## AMASMEDIOJ

La tagon 4an marto la novaĵagentejo EFE dissendis tre favoran raporton pri Esperanto en Ĉinio, sekve de kiu poste informis multaj ĵurnaloj. Ekzemple, la senpaga ADN.Ĉio jam videblas en la HEF-paĝaro.

MENCIO EN RADIO

La lundon 5an de aprilo en tutlanda radielsendejo Onda Cero ĉirkaŭ la 11ª vespere la parolisto legis "novaĵon" el la ĵurnalo ABC de la jaro 1910, kiu temis pri la uzo de Esperanto fare de asocio de militistoj.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj **konversaciaj rondo**j okazas ĉiulunde, ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Lundon 19an apr. Vizitos nin Faustino Castaño, veterana samideano el Gijón.

La tradicia legado de Donkiĥoto en Esperanto okazos la ĵaŭdon 22an je la 18:00 en la Círculo de Bellas Artes, strato Alcalá.

Publika prezento de la nova libro de Antonio Marco "Crónicas del movimiento obrero esperantista", hispanlingva versio de pli frua esperanta verko. Prezentos ĝin Pedro Sanz kaj Toño del Barrio la ĵaŭdon 22an de aprilo je la 19:30 en la librejo Traficantes de Sueños, kiu situas ĉe strato Embajadores 35, Local 6.

La libro estas aĉetebla skribante al pedrosanzsateh@gmail.com. Prezo: 8,00 €; se vi mendas tri aŭ pli ekzemplerojn: po 5,00 €.

***************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID